Mi estas char vi estas…
(Vagyok, mert vagy…)

Mi estas	Vi estas
char vi estas.	char mi estas.
Mi vin amas,	Vi min amas,
char vi amas min.	char mi amas vin.
Mi malamas vin,	Vi malamas min,
char vi malamas min.	char mi malamas vin.
Mi suferas,	Vi suferas,
char vi suferas.	char mi suferas.
Mi ploras,	Vi ploras,
char vi ploras.	char mi ploras.
Mi havas zorgon pri vi,	Vi havas zorgon pri mi,
char vi havas zorgon pri mi.	char mi havas zorgon pri vi.
Mi dormas,	Vi dormas,
char vi dormas.	char mi dormas.
Mi maldormas,	Vi maldormas,
char vi maldormas.	char mi maldormas.
Mi malsatas,	Vi malsatas,
char vi malsatas.	char mi malsatas.
Mi soifas,	Vi soifas,
char vi soifas.	char mi soifas.

Kaj vi estas mia peplomo, pretigita mia lito, se mi estas via peplomo,
pretigita via lito
Kaj mia pura fonto vi estas, mia fresha herbejo, se via pura fonto, fresha
herbejo mi estas.
Kaj miaj suno, luno, stelo vi estas, se viaj suno, luno, stelo
mi estas.
Kaj miaj nokto, tago vi estas, se viaj nokto,
tago mi estas.
Kaj mi estas pro vi, se pro mi vi estas kaj vi estas char mi estas pro vi.
Kaj donu manon, char donas ankau mi.
kaj donu vin mem tute al mi, char ankau mi min donas.

Tradukita de János Ruff